



INSTIGO POR NI

Evento, kiu ligas la internacilingvan movadon al la plej progresemaj klopodoj, al la plej urgaj taskoj de la nuntempo, estis sen ajna dubo la Tutmonda Kongreso de la pacemaj fortoj en Moskvo. En tiu ĉi gravega forumo partoprenis oficiale ankaŭ reprezentantoj de la Mondpaca Esperantista Movado kaj de TEJO.

Rerigardante la 20jaran historion de MEM oni povas konstati, ke nur tia movado esperantista en la socialisma ŝtato povas progresigi la aferon de IL, kiu emas servi al la tuta socio, al ĝiaj celoj kaj interesoj. Tion aspiris ankaŭ la MEM-iniciatintoj.

Inter la pioniroj de la hodiaŭa prestiĝa epoko de MEM kaj de la tuta movado esperantista en la socialismaj landoj endas rememori Rudolfin Burda, la kunfondinton kaj la unuan prezidanton de MEM. Li ĉiam strebis, ke Esperanto estu ilo por efektiva internacia kunlaboro, ne ia riproĉata kaj primokata hobbio, kies adeptoj trovus sian plezuron en kolektado de bagatelaĵoj. Burda fordonis multajn jarojn de sia vivo por servigi Esperanton, tiun ĉi unikan instrumenton de la interkompreniĝo, al la noblaj humanismaj ideoj de nia socio.

La 20-a datreveno de MEM instigu nin ĉiujn al pli fervora subteno al ties programo, al revigligo de ĉiuj pasivuloj !

/k/

NAD VAŜIMI DOPISY

V posledním období, od dubnové konference v Ostravě, probíhá v našem svazu, ve všech jeho orgánech i ve styku s členy intenzivní formování a krystalizování názorů na jednotlivé nedořešené otázky v naší činnosti. To poznávají nejenom členové předsednictva a pracovníci sekretariátu, ale i funkcionáři skupin, kroužků a řadoví členové svazu. Důkazem toho jsou i vaše četné dopisy, které dostávám.

Jsem opravdu rád, že naše snaha nezůstává bez odezvy, a i když se naše ná-

zory někdy různí, je to zatím jediná možnost, jak se vzájemně poradit. Dozvolte mi proto, abych se nyní zastavil u několika skutečností, které jsou sice většinou z vás již zcela srozumitelné, přesto však je třeba je zopakovat některým členům.

Předně se dotknou ještě jednou zřizování místních skupin. Jak jsme již vysvětlovali v minulém čísle Starta i v Informacích, je třeba, aby svaz měl svoje základní organizace, které tvoří jeho vlastní strukturu. Jde vlast-

ně o vytvoření určitého právního vztahu. Nic více a nic méně. Jde o to, aby-
chom, stejně jako třeba svaz rybářů,
měli možnost pracovat se svými základ-
ními organizacemi - my jim říkáme míst-
ní skupiny - a ne jenom s jednotliv-
ci. Kroužek, který není členem svazu,
není pro svaz "právní osobou", ale
řadou jednotlivců, stejně jako lidé s
rybářským lístkem ještě nemusí tvořit
základní organizaci svazu rybářů.

I když víme, že období, kdy budeme
moci prostřednictvím svých MS účinně
řídít a ovlivňovat působnost svazu v
jednotlivých místech republiky, je dosti
vzdálené, přesto jsme nejen opti-
mističtí, ale i trpěliví, a musíme se
postupně, plánovitě a prozíravě při-
pravovat na tento čas. Víím, že skeptik
může toto tvrzení považovat za na-
ivní snění anebo povídání, protože sou-
časnost nepřináší dosud tolik možnos-
tí, a leckomu z vás se mohou naše jed-
nání s ústředními orgány zdát příliš
zdlouhavá. Přesto však funkcionáři sva-
zu očekávají v blízké budoucnosti příz-
nivě výsledky těchto jednání. Rozhod-
nutí, která z nich vzejdou, nelze při-
pravít jinak než důkladně, bez ukva-
penosti, je třeba zvážit všechny okol-
nosti a rozhodnout komplexně.

Na naši výzvu ke změně termínu při
placení členských příspěvků přišla řa-
da hezkých dopisů a dokonce již byly
poukázány první platby, například z EK
Praha. Chci se však zastavit u jedno-
ho dopisu s dosti odlišným obsahem,
který vybízí k polemice. Někomu se mň-
že naše rozhodnutí o termínu zdát ne-
vhodné nebo i podivné. Ano, na podzim
se kupují brambory, ovoce, někde i
otop na zimu, jsou výdaje s vánocemi.
Jenže na začátku roku se platby stej-
ně nepoukazovaly a zdůvodňovalo se to
jiným předplatným, pojistkami, rekre-
ací apod. I na jaře jsou různé důvody
k vydáním, stejně tak v létě. Tak ja-
kýpak vhodný termín pro všechny ?

Z celkového vašeho ohlasu však sou-
díme, že plně chápete potřeby svazu,
jeho včasné finanční zabezpečení, že
chceme-li vydat nové knihy, musíme
mít předem peníze na zaplacení autor-
ského honoráře, překladatele, případ-
ně za jazykovou revizi textu, na fak-
tury z tiskárny, grafickou úpravu atd.
Ano, potřebujeme získat dostatek pro-
středků k vydání dvou knih - "Pašojal

plena posedo" a povídek J. Nesvadby. O
první je velký zájem nejen u nás, ale
i v zahraničí, druhá by měla být pře-
kvapením pro vás i pro vaše přátele ve
světě. A to nemluvím o tom, že nutně
potřebujeme již na začátku roku zís-
kat přehled, pro kolik členů máme za-
jistit Starto a další.

V dopise, o němž se zmiňují, byla
též zmínka, kterou chci citovat doslo-
va: "Je pravda, že příspěvky jiných
organizací bývají zpravidla i několi-
kanásobně vyšší. Nesmí se ale zapomín-
nat, že jde zpravidla o organizace, kte-
ré svým členům poskytují nebo umožňu-
jí získat různé výhody, zatímco člen-
ství v ČES není spojeno prakticky se
žádnými hmotnými výhodami..."

Ano, je pravda, že vám nemůžeme z
těch maximálně 4 Kčs měsíčně (a to
ještě sotva u poloviny členů) poskyto-
vat žádné hmotné výhody jako třeba ROH.
Autor dopisu však zřejmě zapomněl, že
odborové hnutí či komunistická strana
vznikaly za velmi skromných podmínek
a ve svých začátcích nemohly rovněž
nabídnout svým členům nic jiného než
společnou ideu a organizovaný zápas
za ni. A přesto tehdejší jejich čle-
nové rozhodně nečekali hmotné požit-
ky. Je snad málo být částí celku, v
němž mohu uplatnit svůj zájem a s je-
ho pomocí prosazovat společnou myš-
lenku ?

V další části dopisu autor navrhuje,
aby členské příspěvky byly co nejniž-
ší, lhůty k jejich uhrazení co nej-
vhodnější, a potřebné finanční zdroje
aby se získávaly raději cestou dobro-
volnosti, sbírek a jinými způsoby. Po-
sudeťte sami, zda je tato cesta možná,
důstojná a vhodná, a zda by podobný
požadavek nevedl spíše k přímé likvi-
daci svazu z hospodářských důvodů.

Jsme vám samozřejmě vděční za všeh-
ny vaše připomínky, i za ty, které mo-
hou být odlišné od našich představ,
chceme se s vámi nadále přátelsky a
soudružsky radit, i když nebude nikdy
možno vyhovět všem. Budeme připravovat
taková organizační a kádrová opatření,
aby žádný váš hlas nezapadl, aby kaž-
dý člen měl jistotu, že je skutečně
plnoprávným článkem svazu a ne jenom
osobou, která má právo platit příspěv-
ky. Chceme, aby vaše oprávněné připo-
mínky a realizovatelné požadavky byly
(dokončení na 11. str.)

Pri kelkaj aktualaj problemoj

La eldonaj kondiĉoj por Esperantaj presadoj en nia lando ne estas tro favoraj. Diversaj cirkonstancoj bremsas esence la kvanton de niaj eldonaĵoj, sekve estas klare, ke oni devas tre strikte zorgi pri tio, ke ĉio publikigota, do ankaŭ varbiloj, ĉiuspecaj faldfolioj kaj similaĵoj estu lingve tute senriproĉaj. Estas unu - kaj eble la unua devo de la Lingva Komisiono zorgi pri tio.

Aliflanke estas devo de ĉiu deca esperantisto, kiu intencas ĉion ajn publikigi, havigi al si almenaŭ unu taŭgan recenzanton por elimini gramatikajn aŭ pres-erarojn. Nia devizo estu, ke ĉiu presado, aperonta en nia lando, estu vere ornamo de ĉiu libroŝranko aŭ biblioteko. Oni jam sufiĉe multe parolis kaj skribis pri kelkaj faldfolioj, kies aŭtoroj profitis la bonŝancon, ke iu presejo havis iom da vaka kapacito kaj iu loka Nacia Komitato iom da elspez-ebla mono, kaj tuj presigis tekston, kiu enhavis dekojn da gramatikaj kaj stilaj eraroj. Ankaŭ okazadas, ke iu fabriko subite eksopiras esperantigi sian produkto-liston aŭ labor-programon. Tiam kutime restas por tiu ĉi laboro 1-2 tagoj kaj iu loka esperantisto devas ĝin plenumi sen la adekvata terminaro kaj alia helpo. Tiajn kazojn oni povas eviti nur per ĝustatempa planado kaj sufiĉe frua mendo unuflanke kaj per ĝesamsideana memkritiko kaj disciplino aliflanke.

Memkompreneble, multe pli gravas la afero, se temas pri publikigo de gazeta artikolo aŭ eĉ de libro, ĉu originala aŭ tradukita. La lingvaj postuloj estas ĉe ambaŭ la samaj: nenio alia ol perfektaj lingvo kaj stilo estas taŭga. Feliĉe al ni ne mankas aŭtoroj, ĉe kiuj tiu ĉi kondiĉo estas plene garantiita, ni nomu nur por ekzemplo: Echter, Kořínek, Lukáš, Pič, Vondroušek ktp. Logika konkludo ŝajnas esti simpla: se ni havas eminentajn aŭtorojn, ni publikigu nur verkaĵojn kaj tradukojn iliajn, kaj la kvalito de la publikaĵoj estos garantiita. Tamen la problemoj havas ankoraŭ aliajn flankojn, same gravajn.

Verŝajne la plej aktuala problemoj de la tuta Esp. movado estas akiri

junularon. Aŭ la movado havos fortan, entuziasman junularon, aŭ nia tuta penado kaj laboro estos vana, ĉar neniu transprenos nian torĉon. Sed kiel akiri la junan homon por nia ideo, se ni mem ne povas montri, kiel li profitu de sia kono, al kiu li tamen estas dediĉonta certan nombron da laborhoroj (=studhoroj) anstataŭ - ekzemple - plialtigi sian fakajn kvalifikojn.

Estas vere, ke ni havas unu ekzemplon, kiel jam nun juna homo povas fari karieron per Esperanto, sed la rareco de tiu ekzemplo estas tro okulfrapa por ke ĝi povu fariĝi amas-aflogo. Juna homo vivas hodiaŭ rapide kaj ne ŝatas longajn prokrastojn. Li volas vidi la celon proksime antaŭ siaj okuloj. Se temas pri la ekregado de la lingvo, tiam tiu ĉi celo estas realative la plej proksima kompare kun iu ajn lingvo. Jen nia avantaĝo. Sed se temas pri la reala celo, nome pri la praktika persona profito - eble ne nur financa - tiam niaj argumentoj esence lamas. Por kio bezonas la junulo fremdan lingvon? Ĉu por vojaĝado? Ĉedok havigos al li gvidiston kaj interpretiston samtempe kun la transportilo, li povas kviete vojaĝi sidante en autobuso kaj ne malferman-te la buŝon. - Ĉu por legado de beletro en originalo? Por tio li ne havas tempon, cetere oni pli facile havigas al si la nacilingvan tradukon ol la originalon.

Ne, se li studas fremdan lingvon, tiam 1-e por la lernejo, 2-e por povi legi la ĵus aperintan fakliteraturon (daŭrigo sur la 4-a pg.)

6X en Ĉ.Louže

La kabano "Černá louže" apud Rynoltice, distr. Liberec, gastigis jam la 6an fojon 33 junajn esperantistojn el ĈSSR, 3 gastojn el Pollando kaj unu el GDR. La seminarion (5.-7.10) aŭspiciis LG Liberec, Distr. kom. de SJL kaj JS ĈEA. Lektoris A. Slanina, L. Špina kaj V. Vítek, per kulturaj eroj kontribuis E. Seemannová.

La 7an fojon oni kunvenos samloke inter la 1-3a de februaro 1974. Interesitoj ne pli ol 30-jaraj informu vin ĉe LG Liberec. (k)

en originalo. Ĉu li trovos ion pri sia fako en Esperanto? Ĝis nun tre malmulte. Do, pro vi z o r e ni devas lin allogi per io alia, tamen nepre ne per mensogoj aŭ per vanaj promesoj. Ĉu ni havas kelkajn spertojn pri tiaj realaj allogoj?

Jes, ni havas. Mi ilin aludos per nomoj, kiuj jam fariĝis nocioj.

1. MĚlnik - profitanta de la natura sopiro de la juna homo ekkoni la mondon, do vojaĝi. Kompreneble helpe de Esperanto.

2. LANĈOV - vivanta el la same komprenebla kaj sana emo de la junularo, reveni almenaŭ dum la ferioj al la naturo kaj vivi en memvole primitivaj kondiĉoj de la tendaro.

3. M. Juřenová, kiu majstre profitis de la natura ludemo kaj kopiemo de la beboj. Ŝiaj disĉipletoj lernas laŭvorte per ludo kaj ŝatas tion.

4. La konkurso de SPARTO. Ĝi atentigis je kelke da junaj talentoj (lingvaj) kaj certe laborigis multajn.

Se iu demandus, kiun el tiuj kvar vojoj sekvu, la respondo estus la sama kiel se iu demandus, ĉu por ekregi la lingvon oni lernu vortojn, frazojn aŭ gramatikon aŭ ĉu oni legu skribu aŭ parolu. Neniu vojo sola estas taŭga, nur ili ĉiuj kune gvidas al la celo.

Do, se ni ne volas atingi, kiel la aŭtoro de la Bapto de caro Vladimír, ke nia lango=lingvo ne putriĝu kun ni en nia tombo, ni devas uzi ĉiujn vojojn kaj elpensi ankoraŭ novajn kaj novajn por allogi la junularon al la movado. Jen nia tasko n-ro 1.

Tiuj, kiuj volas sekvi la vojojn 1-3, havas fidindajn kaj spertajn gvidantojn en gesamideanoj Vítek, Sittauer, Juřenová. Por la vojo 4a mi proponas aranĝi novan konkurson kun la limdato 21.3.74. Tamen la aĝo de la konkursantoj estu limigita ĝis 25 jaroj kaj same la aĝo de la jurianoj. La konkursantoj liveru koncizan, strikte al-teman, bonstilan artikolon pri la sola temo:

KIEL VIGLIGI LA INTERESON KAJ AĜEMON DE LA JUNULARO EN LA ĈS.ESP. MOVADO

La redakcio bonvenigos ĉiun sinceran konsideron pri tiu ĉi temo, do ankaŭ de la pli aĝaj gesamideanoj, kiuj ne povas rekte partopreni. (Fx)

T. BALDA 65jara

La Jan de novembro sesdekkvinjariĝis Tomáš Balda, ĝenerala sekretario de MEM, estrarano de ĈEA kaj prezidanto de ties Paca sekcio, estinta sekretario de ĈSEK.

Esperantisto de 1945 li aktive laboris en la ĉs.porpaca movado, kie li hodiaŭ plenumas kelkajn gravajn funkciojn, precipe kiel estrarano de la Ĉeĥa Paskonsilantaro. En 1970 estis al k-do Balda pro liaj meritoj sur tiu ĉi kampo atribuita la Ĉs. pacpremio. Li estas ankaŭ portanto de kelkaj honoraj insignoj.

T. Balda estis iniciatinto kaj la ĉeforganizanto de la sukcesa solidareca kampanjo "Helpe al la batalanta Vjetnamio", kiu trovis konsiderindan eĥon ĉe diversaj organizaĵoj kaj institucioj enlandaj. Per sia persona ekzemplo kaj senlaca klopodado k-do T. Balda multe kontribuis al la socia prestiĝo de IL en Ĉeĥoslovakio. (k)

SUKCESA SJET.

En Kestericiens, Latva SSR, okazis en aŭgusto la XV-a Sovetunia Junulara Esperantista Tendaro kun partopreno de pli ol 250 personoj el 10 sovetaj respublikoj, reprezentantoj de 17, plejparte junaĝaj.

La programo de SJET enhavis tradicion Someran universitaton, tri paralelajn paroligajn kursojn B, kurson por tradukistoj, fakkunvenojn, ciklon de prelegoj pri la Esperanta literaturo, kunvenon de veteranoj, poezian kaj tradukistan konkursojn k.a.

Speciala novaĵo de la ĉijara tendaro estas la t.n. primovada lernejo, aŭ Esp. universitato planita por kvar jaroj. Ĝin gvidis la konata kaj sperta esperantisto-veterano, prof. S. Podkaminer el Leningrado, kiu prelegis pri la postrevolucia Esperanto-Movado en Sovetio, pri la agado de SEU (Sovetia Esp. Unuiĝo) k.a. Prelegis ankaŭ A. Ĥarkovskij, la moskva ĵurnalisto, pri la antaŭrevolucia esperantista movado en Ruslando, A. Vaitilavičius pri UEA k.a.

La sekvontan XVI-an SJET oni planas aranĝi en Litovio.

N. Andrianova, Kievo

LANDO, KIE ONI POVAS LERNI

En printempaj monatoj aperis modesta anonco pri la Internaciaj Esp. Kursoj por instruistoj en la sunplena bulgara urbo Burgas. La rezulto superis ĉian supozon: proksimume 140 aliĝintoj ĉeestis, plejparte instruistoj, ĉar necesas akceli la enkondukon de Esperanto en lernejojn kaj tion solvas la bulgaraj esperantistoj eminente.

La partoprenintoj finis trisemajnan intensan studadon en la elementa, meza kaj supera kursoj. La lasta preparis adeptojn por la ŝtata ekzameno; ĝi estas grava rekono al IL, per kiu povas fieri nur nemultaj landoj.

Spite tion, ke la maro logiĝis, la studmoralo estis altnivela. Krom la trisemajnaj kursoj okazis ankoraŭ dusemajna pedagogia seminario, kiu ankaŭ ebligis ekzamenon. La medio estis vere amika kaj al tio kontribuis ankaŭ bone solvita logoproblemo. Ĉiuj partoprenintoj logiĝis en kvaretaĝa studenta hejmo apud la lernejo. Trifoje dum la tago oni rankontigiĝis ĉe la manĝo. La tuta posttagmezo estis libera ne nur por la studado, sed ankaŭ por la banado kaj sunumo, aŭ promenado en la ĉemara parko. Esperanton oni aŭdis en la ĉirkauaĵo de la urbo riĉa je vidindaĵoj.

Inter kelkaj vesperaj programoj tieaj mi ŝatus menciigi almenaŭ unu: la publikan porpacan manifestacion en la loka teatro, kiun organizis la urba Nacia Komitato kun la regiona filio de Bulgara Esperanto-Asocio. Multnombraj ĉeestantoj aŭdis la festparolon ne nur en la nacia lingvo, sed ankaŭ ĝian Esperantan tradukon. Salutis la kunvenon ok diversnaciaj gastoj, frekventantoj de la Esp. kursoj. En la kultura parto de la festkunveno agrable surprizis folkloro dancgrupo, sed plej profunde impresis preskaŭ 60-membra esp. kantoro "Nigra Maro", en kies varia repertuaro ne mankis "La Espero". Admirinda estis ne nur la altnivela prezentado, sed ankaŭ la entuziasmo por Esperanto.

Kiam mi veturis hejmen, sonis en miaj oreloj: "En la mondon venis nova sento..." kaj trapasante la landlimon de la gastama popolo kun esperantista rondo familia, mi kun la lasta rerigardo salutis ĝin sincere per "Ĝis revido!"

Leonardo

LA ĈEFDELEGITO KOMUNIKAS

Mi jam kelkfoje urgigis ĉe UEA la alsendon de la revuo Esperanto ekde la juna eldono por niaj MA. Nur fine de oktobro sciigis min CO:

"Ĉiuj niaj eldonaĵoj estis en lastaj monatoj regule kaj normale ekspedataj al via lando, kaj ni komence ne komprenis, kial venas tiom da plendoj. Nun ni konkludis, ke vialandaj instancoj intervenis."

Surbaze de tio mi reklamaciis ĉe "Poŝto 120 Praha" kaj postulis la enmanigon de ĉiuj eventuale retenitaj sendaĵoj al niaj membroj. UEA samtempe sciigis min, ke ĝi ankoraŭfoje esploras la aferon por certigi, ĉu almenaŭ en ĝia administrado estas ordo. Espereble la afero solviĝos antaŭ la jarfino. Ĝis tiam mi ne akceptos la pagojn por 1974.

La dua parto de Jarlibro 1973 aperos nur fine de tiu ĉi jaro. Fr. Sviták

REZOLUCIOJ DE E. K.

Kontraŭ la malhomecaj agoj de la ĉilia registaro kaj kontraŭ la milit-

ista politiko de Izraelo en la Proksima Oriento protestis la anoj de IG Třebíč en la rezolucio akceptita ĉe la rondeta jarkunveno la 23an de okt.

Solidarecon kun la heroo popolo de Ĉilio esprimis en sia rezolucio-letero sendita al ĈEA ankaŭ la membroj de la rondeto en Šumperk.

Konkurso de Pola Radio

10-tagan ekskurson tra Pollando aŭ multajn aliajn premiojn kaj objektajn donacojn vi povas gajni, se vi respondos almenaŭ unu el la subaj demandoj:

1) Kiujn atingajojn de Pollando (socialajn, ekonomiajn, kulturajn ktp.) dum la lastaj tridek jaroj vi opinias la plej interesaj? 2) Pri kio karakteriza (nomo, evento, fenomeno, objekto ktp.) vi ekpensas lige kun Pollando? 3) Kiujn establejojn projektitajn aŭ konstruitajn de poloj en via lando aŭ en la mondo vi konas?

La respondojn sendu al Polskie Radio, 00-950 Warsavio, P.O. Box 46 en koverto signita per "Konkurso" ĝis 31.12.1973.

Neologismofobio kaj neologismomanio

De tempo al tempo aperas en la Esperanta preso artikolo alarmanta kontraŭ timenda inundo de neologismoj, en E-o. Tiel oni almenaŭ asertas. Ankaŭ en Starto aperis lastatempe tiaj vortoj, precipe de V. Pechoč. Ing. E. Felix prilumigis la problemon el vidpunkto sobra kaj erudicia en la 35a n-ro. Ni provu ankoraŭ pli detale observi la aferon.

Neologismofobio, t.e. troa timo antaŭ neologismoj, aperis kiel rezulto de alia malsano, neologismomanio, ekkestinta en la tridekaj jaroj de nia jarcento. Sed laŭvere neologismojn enkondukadis jam dro Zamenhof mem. Oni eĉ ĉesis timi neologismojn kaj fakvortojn, kiuj aspektas krazaŭ homonimoj kun afikse derivitaj vortoj (boleto anst. boledo, kataro, amido, kantino ks.)

La kontraŭuloj de neologismoj rekrutiĝas el du specoj de esperantistoj. La unuaj insistas pri tio, ke la lingvo restu pleje facila, kun malmulte da lernenda materialo, sen pretendoj sur kampoj de arto kaj scienco. Laŭ ili nur tia "facila" lingvo por turisto kaj leĝera lingvouzado havas ŝancon disvastiĝi. La duaj estas ofte la eternaj komencantoj, la nefinlernintoj, adeptoj de la lingva primitiveco.

Sed kiu serioze okupiĝas pri E-o, uzante ĝin sur pretendaj kampoj, baldaŭ ekkonas, ke ne maksimuma simpleco estos en estonto garantio por disvastigo de I.L., sed male, ĝia ĉiuspeca kaj ĉiusfera esprimkapablo, riĉeco kaj ekipiteco per akireblaj fakaj vortaroj.

El tiu vidpunkto kaj post faritaj spertoj oni povas resumi jene: Utilaj estas ĉiuj neologismoj, kiuj esprimas novan nocion, precizigan fakterminon. Neologismoj redonantaj necesajn nuancojn, do novaj preskaŭ-sinonimoj. Utilaj kaj valore riĉigaj estas la sinonimoj por plej ofte uzataj esprimoj de ĉiutaga vivo, precipe adjektivaj, ekz. dura a. p. u. d. malmola, kurta apud mallonga, febla apud malforta ks. Per tiuj ĉi praktikaj prefere dusilabaj vortoj riĉiĝis ne nur la poezia lingvo per novaj rimvortoj, sed riĉiĝas vico de sinonimoj

kaj foriĝas platiga nuancmalriĉeco riĉigata al E-o far pluraj lingvistoj (F. Trávníček k.a.). Tia riĉeco en sinonimoj estas estetika avantaĝo de naciaj lingvoj, ĉu ĝin ne darfas havi E-o? Ni vidu ekz. en la ĉeĥa: krásný, hezký, pěkný, lepý, ošklivý, šeredný, ohavný, ohydný ktp.

Sed unu oni devas memori: se tiuj praktikaj vortoj, tiom utilaj, ekz. ĉe tradukado de muziktekstoj, kie estas ŝparenda ĉiu silabo kaj kie E-o kiel lingvo "maldensa" faras ofte kaprompajn problemojn, do se tiuj sinonimoj estu riĉigo, ili devas funkcii en L.I. apud la fundamentaj "mal" - kunmetaĵoj. Ĉar ne pravas aserto, ke la mal-pre fiksaĵaj vortoj havas pli malgrandan elvokivon; tio vere dependas de lingva parolsperto de la lingvouzanto. Prefikso "mal" estas en si mem utiliga kaj permesas al ni krei dialektike inversajn nociojn kaj ofte dezirindajn pliprecizigojn (maltriki, malkudri). Oni rajtus uzi ĝin eĉ ĉe neologismoj (maldura, malkurta).

Pro tio ankaŭ nuancvorto "vori" havas sian plenan ekzistrajton, ĉar "manĝegi" nepre ne havas la nuanccon de "beste manĝi". Ni ja en la ĉeĥa havas "žrát"; en la germana "fressen".

Esperanto havas, kiel la naciaj lingvoj, kunmetitajn vortojn el la baza vortmaterialo apud internaciaj sinonimoj: malsanulejo-hospitalo ks. Komparu kun ĉeĥaj: oběh-cirkulace, aŭ en la germana: Fernsprecher-Telefon ks.

Multaj el la neologismoj kontribuas al koncizigo de la lingvo. Tia evoluo estas unu el trajtoj de la atomepoka I-amaj "interkonatiga" ricevas paralelan koncizan formon "interkona", frazo el antaŭ 60 jaroj "Dimanĉe mi veturis per aŭtomobilo al Prago kaj eĉ estus veturinta ĝis Brno" povas laŭ ekzaktaĵaj reguloj de vortfarado hodiaŭ konciziĝi ankaŭ jene: "Dimanĉe mi autis Pragon kaj eĉ veturintus ĝis Brno".

Malutilaj estas neologismoj aŭ pluraj sinonimoj por ĉiuj fakesprimoj, kiuj plej ofte naskiĝas pro tio, ke la bezonanto ne havas la fakvorton je dispono, ne scias pri la jam ekzistanta termino kaj do kreas facilanime novan vorton, balaston por la vortaroj. Tial ni havas por la ĉeĥa "sob": norda cervo, boaco, rangifero, por "elektronkový počítač" komputilo, -komputero, komputoro

ktp.E-o ne havas lingvaj tradicio kaj inercio tian reguligan forton kiel en naciaj lingvoj, kaj la tasko de la Akademio, allasi paralele ekzisti plurajn formojn kaj nur post sufiĉe longa tempo akcepti aŭ rekomendi la plej taŭgan aŭ uzitan formon, ŝajnas al mi ne tro feliĉa kaj naskanta balastvortojn kaj ŝveliganta vortarojn.

Iuj neologismoj naskiĝas el bezono, ekz. "fora" kiel sinonimo por la tro longa, malproksima, kvankam tiun signifon devis al ĝi doni poste nur certa konvencio. Ĉar ja forĵeti nepre ne estas malproksimen ĵeti; ankaŭ forsalti me signifas malproksimensalti. Estis krome proponitaj dista, lontana, kvankam pleje uziĝas "fora". Mia opinio en planlingvo ne necesas eksperimenti dum jardekoj kun deko da sinonimoj, sed plej taŭgan tian formon povus elekti kaj rekomendi la Akademio en pli kurta tempospaco.

Estus do bone, se oni konscius, kie riĉigo de I.L. estas utila kaj bezonata, kaj kiaj neologismoj estas la nedezirindaj kaj kreantaj kaoson (ĉu por infangardeno necesas kindergarteno, por Finnlando Suomio, por Bohemujo Ĉeĥio?) Kaj oni sciu ankaŭ ke, simile kiel nacilingvanoj, ekzistos esperantistoj, por kiuj sufiĉas kelkcent radikoj, ofte eĉ ne tiom, por iliaj primitivaj bezonoj (ekz. por kolektado de poŝtmarkoj aŭ alumetskatoletoj kc.) kaj aliaj, kiuj oferos tempon por ellerno de novaj fak-esprimoj kaj nuancvortoj por ĝui la pretendajn verkojn de arto kaj scienco en plena riĉeco, sen platiga reliefigo. Jes, Esperanto taŭge servos al ambau. Sed por L.I., ĝia evoluo kaj serioza uzebleco nepre pli valoras la duaj.

Ĉs. televido pri E-o

Marde la 18an de septembro je 20,45 h. aperis sur la televida ekrano (II-a programo) membro de EK Mělník V.Vítek, kiu raportis pri siaj impresoj en la Esp. renkontigo enkadre de la junulara mondfestivalo en Berlino. Ĉiuj tre helpus nian aferon skribante al la studio (Praha 1, Jindřišská 16, 110 00, Televizní klub mladých) por peti pri pliaj similaj elsendoj aŭ instigi lernigon de Esperanto.

DEMANDO: Jam Grabowski enkondukis la formon -as anst. estas, ekz. ŝi belas anst. ŝi estas bela. Tiu ĉi mallongigo enradikiĝis en la ĉiutaga lingvo, ekz. en la frazoj: Li pravas, Tio ne gravas ktp. Tamen en la PIV oni trovas ĉe la kapvorto -as nur jenan noton ad 2.: Memstara vorto, iufoje uzata en poezio kiel kopulo anst. "estas"..."

RESPONDO: Ĉi tie oni parolas pri du diversaj gramatikaj fenomenoj: 1) as (anstataŭ "estas") estas nuntempe rigardata kiel licenco aperinta en la menciita poemo (Sinjoro Tadeo de Mickiewicz, traduko de Grabowski) imitata tre malofte de "novaj talentoj" dum tiu es unuaj paŝoj sur Parnason. Iam oni observis, ĉu ĝi radikiĝos en la lingvo. Tio ne okazis.

2) "gravas", "eblas", "utilas" estas fenomeno el sako alia; pri skribita reguligo de tio mi nenion scias,

LINGVA KONSILANTO

sed scias, ke ĝi radikiĝis en la lingvo kaj floras tie kiel praktika esprimo plene respondanta al la spirito de la lingvo. La ofta uzado en ĵurnalismo kaj beleto, kaj la fakto, ke la formoj aperis en diversaj eldonaĵoj kaj en la konversacio spontane, sendepende unu de la alia, estas - krom la logiko - la sola argumento, kiun, laŭ mia opinio, oni povas meti kiel respondon. Tiaj lingvaj fenomenoj radikiĝis en E. tute ne rare, kaj ili ne estas reguligataj per skribitaj normoj.

DEMANDO: Kie estas skribite (ĉu "skribitas"?) ke oni povas uzi la saman mallongigon ankaŭ ĉe adverbo, ekz. estas grave = gravas ktp.?

RESPONDO: Skribitas ŝajnas al mi sufiĉe logika. Foje ĝi kaj aliaj formoj similaj, ekz. "venintis" ofte k laŭplane aperadis en gazeto redaktata de kleraj, rutinaj Esperantistoj ("Informoj de Estonio") sed oni publike kondamnis (en aliaj gazetoj, ekz. en "Esperanto" de UEA) tiajn formojn. La dua mondmilito ĉesigis aperadon de "Informoj" kaj ankaŭ la problemon, kiu de tiam ne plu releviĝis. Oni ne plu renkontas tiajn formojn en niaj eldonaĵoj.

Respondis Vuk Echtner

Rondeta vivo

B R N O - Inter la 2a kaj 20a de okt. estis instalita en la Universitato "Biblioteko Brno" ekspozicio de la Esperantaj libroj, prospektoj, afiŝoj ktp. en kvin grandaj vitroŝrankoj. Oni ekspoziciis ĉirkaŭ 100 beletrajn k sciencajn verkojn. Kompletigis la kolekton tekstoj kun eldiroj de diversaj eminentuloj pri E-o. Pri la ekspozicio, kiun spektis 7050 vizitantoj, multon meritas la biblioteka direktoro d-ro Kubíček k.a.

Preskaŭ ĉiusemajne ricevas la 7-8 lokaj gazetoj priesperantajn novaĵojn dank al s-ro Vondroušek.

L I B E R E C - Dek komencantojn, el tio naŭ junulojn ĝis 25-jarajn, instruas pri E-o s-ro L. Špina.

O S T R A V A (PORUBA) - Enkadre de la ĉiumonataj vesperoj prelegis en la loka grupo lastatempe D. Kočvara, la vicprezidanto de ĈEA, J. Hanzelka, S. Chaloupka, M. Skařupová k.a. - Elmontran ŝrankon kun esperantaĵoj apud la kinujo Dukla prizorgas R. Wolkowinsky.

P Í S E K - En la aŭtuna sezono oni preparis Esp. kursojn por progresintoj kaj serion da prelegoj por la publiko.

Du esperantistoj el GDR, A. Ehrlich kaj W. Weissbach, festis somere, kiel gastoj de la loka klubo, 50-jaran jubileon de sia aniĝo al la laboristaj E. rondetoj.

P O D Ě B R A D Y - Malfermiĝis la 23an de oktobro kurso por komencantoj. 21 interesitojn instruas J. Skramuský.

T Ĥ E B Í Ĉ - Oni aranĝis du kursojn - aparte por plenaĝuloj kaj lernejanokaj renovigis la jam tradiciajn kulturajn kunsidojn en la klubejo. Unu el ili estis dediĉita al la 100-jara naskiĝjubileo de M. Švabinský. - La 23an de okt. okazis la jarkunveno de LG.

Z N O J M O - EK ĉe la Kleriga societo lanĉis en septembro kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Ilin ambau frekventas 21 anoj, precipe gejunuloj.

PRI LA ESPERANTO-VIVO en Ĉeĥoslovakio informis lastatempe Radio Roma laŭ la gazetoj Starto kaj Esp. Slovaka.

ŽÁDÁME DŮRAZNĚ všechny přispěvatele, aby svoje zprávy a příspěvky určené ke zveřejnění zaslali svazu s určením "redakce Starta" (podle potřeby ve dvojím vyhotovení) a podle možnosti v esperantu, zejména pokud jde o rubriku **RONDETA VIVO** ! Děkujeme !

Medalo al A. Bartošík

Okaze de la 500-jara naskiĝjubileo de M. Kopernik estis aranĝita en Poznań la Tutmonda filatela ekspozicio **POLSKA 73** (19.8.-2.9.1973). Ĉin partoprenis per sia kolekto "Historio kaj nuntempo de Esperanto" ankaŭ s-ro A. Bartošík el Praha. El 13 laŭtemaj kolektoj el Ĉeĥoslovakio sole al lia kolekto estis aljuĝita la granda orumita medalo kaj honora premio - metala plastiko - N. Kopernik.

Post tia sukceso en Poznań la sama kolekto estis montrita en la Tutŝtata filatela ekspozicio **TEMAFILA 1973** en Sezimovo Ústí, kie al ĝi denove estis aljuĝita granda orumita medalo kaj honora premio - kristala vazo kun oraj dediĉvortoj de ZK ROH Sezimovo Ústí.

La 11an de okt. la ĉs. televido en sia 1-a programo montris la kolekton kun mallonga komentario.


KRONIKO

Forpasis la 9an de oktobro Antoni **Seeman**, estinta reĝisoro kaj aktoro de la "Verda Ĉaro" de J. Baghy, gajninto en la Belartaj Konkursoj de UEA kiel dramverkisto.

La 4an de okt. ĝisvivis sian 60-jariĝon **Štěpán Urban** el Praha, konservatoria profesoro, aŭtoro de 1 fablaro Nova Ezopo eldonita de la Stafeto. Li aŭtoras krome en diversaj E. muziktekstoj.

Geedziĝis en Dobruška la 20an de okt. **Marta Macková** kaj **Oldřich Antoš**. Koran gratulon !

AL JUNULARAJ BLANKAJ FERIOJ en Kōronowo apud Bydgoszcz (27.12.73-4.1.74) invitas "Juventur" en Bydgoszcz kune kun la Pola Esp. Junularo. La kotizo estas 720 zlotoj.



SIGNALILO

FEROJISTA
SEKCIO
DE ĈEA

La konferenco de la Fervoĵista Sekcio de ĈEA okazis ĉijare en Plzeň (15.-17.9.1973).

La unuan tagon, sabaton antaŭtagmeze, la partoprenantoj vizitis la urban kaj bierfabrikan muzeojn, la preĝejturon kaj aliajn objektojn.

Posttagmeze la prezidanto de FS ĈEA bonvenigis ĉiujn gepartoprenantojn inkl. de la eks-

terlandaj gastoj - la prezidanton de Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio (IFEF) J.Giesner, la IFEF-kasiston O.Walder, la eksprezidanton de IFEF K. de Jong kun la edzino, plue du esperantistajn fervoĵistojn el GDR kaj kolegon el Rumanio. La prezidanto de EK Plzeň V.Pechoč bonvenigis la ĉeestantaron en la nomo de la geklubanoj. La prezidanto de IFEF substrekis en sia salutparolo gravecon de la informado en- kaj pri la Esp. movado. Dum la kunsido oni menciis, ke en Plzeň jam en 1923 laboris en la esperantista fervoĵista movado inspektoro de ČSD J. Blažek.

La sekcia prezidanto informis en sia raporto pri la laboro de FS en la pasinta periodo. Li menciis, ke "...ni ne povas esti kontentaj entute pri nia laboro, precipe se temas pri varbado de novaj anoj. Ni ne ĉiam montras la utilecon de Esperanto en diversaj kampoj, en la faka aŭ mondpaĉa movado".

FEROJISTOJ EN PLZEŇ

La prezidanto plue parolis pri la laboro de la estraro, komitato kaj pri la oferema laboro de unuopaj kolegoj. Kun aplaŭdo estis akceptita propono al kunlaboro kun la fondota Trafika Sekcio de AĜSSR. La parolanto substrekis neceson subteni per ĉiuj fortoj ĈEA, ĉar ĉiu devas konsciigi, ke sen ĈEA la Sekcio ne povus ekzisti.

Post lia raporto la ĉeestantoj rememoris per ekstaro la mortintan kolegon V.Růžička el Děčín, viglan kaj ofereman fakulon, kiu dediĉis multe da tempo al la fervoĵista movado.

La sabatan vesperon oni travivis komune en agrabla medio de la restoracio "Bohemia".

Dimanĉe antaŭtagmeze faris interesan prelegon pri la lasta IFEF-kongreso en Arhus (Danlando) kaj pri Taragona (Hispanio), la venonta kongresejo - la IFEF-prezidanto J.Giesner.

Posttagmeze oni ekskursis al la ĉarma kastelo "Kozel" proksime de Plzeň. La neforgeseblajn momentojn travivis ĉiuj en la kastela teatro, kie ing. J.Vencl el Č.Třebová deklamis la poemon "Maro" de Jiří Wolker.

La adiaŭa vespero okazis en gaja etoso, precipe pro gajaj rakontoj kaj rememoroj el diversaj Esp. renkontiĝoj. Ĉe la vesperfino la kolegoj el G D R transdonis donaceton al la ĉeforganizanto de la konferenco, L.Láni el Plzeň, esprimante la esperon, ke la reciprokaj rilatoj daŭros.

GESAMIDEANOJ, kiuj interesiĝas pri la "Internacia Fervoĵisto" kaj ĝis nun ne ricevis propagandajn numerojn, tuj skribu al J.Pištor, Nám.mírul 1746, 560 02 Č.Třebová.

Al la sama adreso skribu tiuj, kiuj intencas viziti jam la KVINAN ESPERANTAN BALON, la 2an de februaro 1974 en Č.Třebová. Prizorgu por vi lokbiletojn!

SKRIBAN KURSON por komencantoj gvidas Mil. Blažek, Bezděkov 470, 560 02 Česká Třebová. Profitu de tiu ĉi ebleco lerni Esperanton!

0

JUNA AMIKO ĉ. 1, roĉnik 1973-1974 vyšlo v uplynulých dnech. Pokud jste si tento časopis ještě neobjednali, učinite tak co nejdříve a předplatné Kčs 15.- poukažite na konto Českého esperantského svazu!

SORTODECIDA VETURO

Proksimiĝis la tria horo posttagmeza kaj Jozefo, ordiginte la paperojn kaj skribilojn sur sia labortablo, ŝlisis la tirkestojn kaj preparis sin al forlaso de la oficejo. Tiun tagon li ne povis rekte veturi hejmen, ĉar vespere li estis festonta kun la edzino la unuan datrevenon de la geedziĝo kaj li ja ne povis aperi antaŭ ŝi kun la malplenaj manoj ! Unue li devis halti en la urbo kaj aĉeti por ŝi belan donaceton, kiun ŝi tion meritis !

"Mi promenos tra la urbo kaj observos vendejvitrienojn", li rezonis, "kaj se mi ekvidos ion plaĉan, tuj mi aĉetos ĝin por ŝi por esprimi mian dankemon pro ŝia ĉiama afableco kaj samtempe por montri, ke mi sentas min feliĉa en ŝia kunesto."

Elirinte el la fabriko, li celigis siajn paŝojn al la urbocentro, kie la plej multaj vendejoj estis troveblaj. Apenaŭ li perceptis la ĉirkaŭaĵon, lia menso okupigis nur pri elekto de la plej trafa donaco, kiun Anjo povus akcepti kun vera gojo. Ŝia kontento estis por li ĉiam la plej bona repago por la donacetoj.

"Ĉu mi aĉetu bluzon aŭ tesilan ŝtofon por nova kostumo, aŭ arĝentan braceleton ?", li meditis. Subite li trovis sin staranta antaŭ la vitrino de ŝu-vendejo kaj fikse rigardanta unu paron da ŝuoj. Tuj li rememoris, ke ĝuste ĉi tiuj helbrunaj brilantaj ŝuoj kun mezaltaj kalkanumoj kaptis ŝian atenton dum antaŭnelonga komuna promeno. Senhezite li eniris la vendejon kaj demandis junan vendistinon pri la ekspoziciataj ŝuoj n-ro 6. Li ricevis ilin kaj estis feliĉa. En bona humoro li eliris en la starton, tenante skatolon kun la ŝuoj sub unu brako kaj sian aktujon sub la dua. En alia proksima vendejo li aĉetis kelkajn dolĉaĵojn kaj botelon da ĉampano. Mankas al mi nur bukedo, sed tiun tuj mi havigos por mi en la najbara starto ĉe florbutikistino", li pensis. "Anjo ŝatas diantojn."

Nenion alian li jam bezonis ol plej rapide atingi aŭtobus-stacion kaj veturi hejmen, al Jablunkov. Preterpasante hotelon Slovan li subite ekaŭdis iun voki "Jo-ze-fo, a-ten-du !" Li turniĝis kaj tuj ekkonis iamajn bonajn amikojn Karlon kaj Petron.

"Saluton, knaboj !", vokis Jozefo, aletendante sian dekstran manon al ambaŭ.

"Saluton, Jozefo !", respondis Petro kaj Karlo tuj aldonis :

"Al diablo ! Ni ja ne vidis unu la alian la tutan eternon ! Post kiam vi edziĝis, vi evitas la ĝuadon de la socia vivo kaj forgesas malnovajn kunbatalintojn, tio ne estas tro ĝentila de vi !" Kaj Petro daŭrigis :

"Ĉu vi havas ian novan junulinon, ĉar vi portas bukedon ? Venu kun ni al Slovan je unu biereto kaj rakontu, kiel vi fartas ! Cetere estas sufiĉe varme kaj oni ja devas forpeli la soifon, ĉu ?"

Jozefo tuj sciis, ke estos malfacile liberigi de ili. Tamen li provis :

"Knaboj, mi tre bedaŭras, sed mi ĝuste rapidas hejmen por festi kun mia edzino la unuan datrevenon de la geedziĝo. En alia kazo mi certe kunirus".

"La edzino atendu momenton", insistis ambaŭ amikoj, "finfine kun ŝi vi estas preskaŭ senĉese, sed malnovajn amikojn vi renkontas unufoje en la jaro ! Ne lasu vin sklavigadi kaj alkutimigu sin al respektado de la viraj bezonoj !"

Ju pli multe Jozefo defendis sin, des pli la amikoj insistis, ĝis fine li ekkonis, ke li estas kaptita, se li ne deziras ilin ofendi - kaj tion vere li ne volis !

Tempo rapide pasis en gaja, ĉebiera konversacio. Post la kvara kruĉo Jozefo rimarkis :

"Amikoj, ne koleru, sed jam vere mi devas foriri ! Baldaŭ forveturos mia lasta aŭtobuso".

"Ne zorgu, Jozefo", respondis suverene Karlo, "ekstere staras mia Ŝkoda kaj post plua biero mi veturigos vin hejmen".

"Ĉu vi ne timas veturi en tia stato ?", demandis Jozefo, "ses bieroj estas ses bieroj !"

"Mi kutimis veturi en pli malbona stato kaj neniam io okazis ! Ne estu tim-

emulo, ja mi estas longjara ŝoforo !"

Kiam vesperigis, el Slovan eliris tri balanciĝantaj viroj. La lasta portis bukedon, aktujon kaj skatolon kun ŝuoj. Ili enautigis kaj ekveturis.

Tiun vesperon Anjo vane atendis sian edzon. Li restis senmove kuŝanta tri kilometrojn antaŭ Jablunkov, sur la apudŝosea kampo antaŭ la renversita aŭtomobilo. Li dormis senspire kaj lia dekstra mano daŭre premis la bukedon de dianoj.

(Dua premio en la literatura konkurso de STARTO, fako originala prozo)

+ t e s i l o : speco de artefarita vestoŝtofo

(dokončení z 2.strany)

včas plněny. Svaz, předsednictvo i sekretariát musí být pro členy a nikdy naopak. To však vůbec neznamená, že budeme jednat jenom podle jakýchkoliv názorů a přání.

Všichni funkcionáři MS a kroužků musí společně s orgány svazu plnit nejenom povinnosti vyplývající z odborné činnosti svazu, ale zároveň i působit na své členy politicky, vést je k na-

plňování úkolů, které nám přísluší a budou příslušet při uplatňování esperanta pro mírové a jiné závažné cíle. Musíme pracovat tak, abychom byli nejenom ekonomicky soběstační, ale abychom mohli kdykoliv složit účty ze své práce. Jsem si jist, že to se všemi poctivými a rozumnými členy našeho svazu, přes všechny dosavadní problémy a potíže, dokážeme !

Z. Křimský

Ni legis...

PACO - AFERO DE ĈIUJ. Almanaketo de la Centra Komitato de Nacia Fronto de Slovaka Socialisma Respubliko, dediĉita al la Monda Kongreso de pacamaj fortoj en Moskvo. Eldonis la eldonejo OBZOR en Bratislava, 1973, preparis MEM-sekcio de AESSR ; 25 paĝoj.

Ni prezentas al ĉiuj anoj de MEM kaj al la tutmonda esperantistaro kelkajn materialojn kun alvoko, ke ĉiu esperantisto kontribuu laŭ siaj kapabloj ... al tio, ke la ideoj de paco firme enradikiĝu en nia vivo, oni diras en la antaŭparolo.

ĈĤRULIGIS NI FAJRON EN LA KOR' de Nadia A n d r i a n o v a, eld. en Kievo, 312 pĝ., 30 000 ekzempleroj. La libro rakontas pri V. Eroŝenko, la fama blinda poeto esperantista, kiu travojaĝis la mondon dank'al Esperanto. La autorinon de la libro, verkita en la ukraina lingvo, rememoras pluraj ĉs. esperantistoj el ŝia vizito al Ĉeĥoslovakio antaŭ du jaroj.


ESZPERANTÓ MAGAZIN, la 1-a n-ro 1973, Budapeŝto, plejparte en la hungara k por tiuj, kiuj interesigas pri la solvo de la monda lingvo-problemo. La magazino aperados sesfoje jare en 10 mil ekzempleroj kaj sur 32 paĝoj. En la numero oni trovas citaĵon el la organo de ĈEA, Starto.

RIDU PER ESPERANTO. La humuro neniam mankis ankaŭ en la Ĥsp. gazetoj. Spritaĵojn ofte liveris en la pasintaj jaroj ekz. "Esperanto-Gazeto", redaktata de T. Sekelj. Tiu ĉi estas redaktinto de la kolekto aperinta nun zorge de Internacia Kultura Servo, Zagreb, sur 55 paĝoj. La apuda karikaturo estas prenita el la avizita libreto.


(kni)

LIGU KONTAKTON KUN LA GEJUNULOJ EL HAVANA ESPERANTO-RONDO, APARTADO 314, HABANA 1, C U B A.

SE NI ĈIUJ STREĈOS
NIAJN FORTOJN, ESPERANTO
NEPRE VEN



Členka do sekretariátu



VYHRÁLI JSTE ?

Dne 24.října bylo v Praze provedeno vylosování knižních poukázek ČES. Tažena byla tato čísla :

1.cena - zájezd na 59.UK (nebo zboží v hodnotě 2000 Kčs) č. 1973

2.cena - bezplatný pobyt na

LET v Lančově (2 osoby) č. 2638. 3.cena - pobyt v Lančově pro 1 osobu č. 2491

4.cena - zboží v hodnotě 100 Kčs - č. 2091. 5.cena - esp. knihy a odznaky za 50 Kčs - č. 2703. 6.-10.cena - sada odznaků : 297, 1347, 2404, 3794, 4243.

11.-50.cena - esp. publikace a odznaky v hodnotě 10 Kčs : 114, 320, 438, 555, 579, 836, 1114, 1202, 1350, 1751, 1797, 1871, 2092, 2194, 2320, 2460, 2593, 2791, 2868, 2901, 3061, 3093, 3197, 3333, 3354, 3625, 3795, 3861, 3960, 4053, 4099, 4308, 4468, 4478, 4600, 4632, 4791, 4885, 4908, 4915. 51.-100.cena - esp. publikace a odznaky v hodnotě 5 Kčs : 10, 36, 72, 281, 331, 333, 348, 400, 747, 755, 759, 779, 1041, 1297, 1338, 1435, 1436, 1768, 1851, 1852, 2062, 2484, 2841, 3007, 3020, 3028, 3142, 3225, 3431, 3534, 3707, 3708, 3913, 4038, 4054, 4109, 4142, 4225, 4402, 4451, 4485, 4551, 4609, 4638, 4707, 4810, 4852, 4864, 4881, 4979.

Výherní listina byla rozeslána EK 7.11. Výhry budeme odesílat nebo osobně odevzdávat po předložení vylosované poukázky. Poukázky lze vyměnit do 31.1.74.

Heroldo přednosině pro členy ČES Předsednictvo ČES rozhodlo, že svaz převezme postupně veškerou distribuci dovážených časopisů, aby jednak začal plnit funkci jediného reprezentanta našeho hnutí vůči zahraničí, jednak aby vhodnou formou reguloval dovoz tisku a jeho distribuci uvedl na legální základnu a zároveň aby dal možnost členům svazu předplatit si přednostně nedostatkový časopis Heroldo de Esperanto, který lze dovést pouze v omezeném množství 300 ks. Seznam odběratelů bude proto naplněn zájemci z řad členů kategorií A,B,C,D a teprve poté z řad kategorie E a nečlenů. Nečlenové budou navíc platit plné poštovné a náklady na distribuci ve výši 10 Kčs ročně. Předplatné HdE na rok 1974 určil vydavatel částkou 80 Kčs. Za inzeráty do 25 slov zaplatíme v roce 1974 40 Kčs. Předplatné a inzeráty přijímá sekretariát ČES, p.schr.8, Praha 2. Neotálejte s objednávkou, protože do konce roku musíme předat kompletní seznam redakcí HdE v Bruselu.

Spolupracovníci vítáni Sekretariát ČES hledá stále spolupracovníky, zejména pro různé administrativní práce (expedice časopisů, psaní na stroji) částečně i za honorář. Jde hlavně o členy bydlící poblíž Prahy nebo vlastníci psací stroj. Rovněž jsou vítáni zájemci, kteří by chtěli pracovat jako aktivisté v revizní komisi ÚV ČES a u nichž se předpokládá znalost účetní evidence, řízení, práva apod.

Do stálého pracovního poměru přijme sekretariát ČES členku svazu, která umí psát na stroji a alespoň částečně ovládá esperanto a administrativní práce různého druhu. Nástupní plat 1200 Kčs plus odměny podle plnění jmenovitých úkolů. Svaz přijme na toto místo i důchodce - členku nebo člena ČES - pokud by mohl dojíždět do sekretariátu. Nástup možný ihned, nejpozději však 1.4. 1974. Bližší informace podá tajemník ČES Z.Křimský.

Zasedání ÚV 8.prosince tr. se má sejít na svém pravidelném zasedání ÚV svazů. Projedná aktuální otázky činnosti ČES, potvrdí předběžná rozhodnutí předsednictva, určí další směrnice pro svazovou práci a schválí plán činnosti a rozpočet ČES na příští rok.

STARTO - eldonas ĈEA, p.k.8,120 21, Praha. Aperas okfoje jare.Respondeca redaktoro O.Knichal.Red.komitato : inĝ.E.Felix,J.Mařík,inĝ.F.Sviták.- Dohlédací pošta Praha 07, snížený pošt. poplatek povolen RP Praha j.z. P/1-2283/1971. Toto číslo bylo předáno tiskárně dne 12. listopadu 1973.